Vizitas Kubon prezidanto de la esplorkomitato de Rusio.

La generalo de armea korpuso Abelardo Colomé Ibarra, membro de la politika buroo de la komunista partio de Kubo, akceptis en Havano la prezidanton de la komitato de esploroj de la Rusa Federacio, Alexander I. Bastrykin, kiu plenumas oficialan laborviziton en la insulo.
Dum la dialogo inter amba? gvidantoj, ili analizis temojn de intereso pri siaj respektivaj laborkampoj kaj la vojojn por pliprofundigi la rilatojn laborajn kaj kunlaborajn inter amba? institucioj.
La elstara vizitanto havas ampleksan programon de inter?an?o kaj vizitoj tra lokoj de intereso historia kaj socia.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/19048-vizitas-kubon-prezidanto-de-la-esplorkomitato-de-rusio

Radio Habana Cuba